# Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si por Hispanio kaj la homaro

Nº 2 1-a JARKOLEKTO MAR-84

## II-A ANDALUZA KONGRESO DE ESPERANTO




## MALAGA

17 - 19 Aŭgusto 1984

Andaluzia
Nº 2 1-a jarkolekto MAR - 84

Eld: 1-a Esperantista Kongreso de Andaluzio.

Fondita en 1910

Redaktoroj: Alberto FRANCO RAMIREZ. Seviljo
Andrés MARTIN GONZALEZ. Malago
José María RODRIGUEZ HERNANDEZ. Kordovo

Adresoj: Eldona Centro Grupo de Esperanto-IB SENE
Av. Menéndez Pidal S/N
CORDOBA-4

Dissenda C. ASE kaj SEJO
C/ Sol 75
SEVILLA-3

Abona Centro GFU (Sección Esperanto)
C/ Trinidad Grund 28, 2º
MALAGA-1

ENHAVO

| | |
|---|---|
| Ĉefartikolo | 1 |
| Informoj | 2 |
| La aliaj inf. | 4 |
| Baroj | 5 |
| Paĝo de la Junularo | 6 |
| Pri Kino | 7 |
| SEJO-Paĝo | 8 |
| Andaluzia Voĉo | 9 |
| Poezio | 11 |
| Amuzaĵoj | 12 |

"La opinioj verkitaj en ĉi tiu gazeto apartenas nur al la subskribantoj"

Kunlaboras ĉi-numere: Julio HERRERO SEGURA, AEJ, Luis GILPEREZ FRAILE, Jesús MAYORA ESPADA.

# CEFARTIKOLO

Estas jam sufiĉe konata ke la andaluziaj esperantistoj intencas de antaŭ kelkaj jaroj organizi novan asocion regionnivele. Ĉi tio ja NE estas"sendependigi" la esperantistojn de la hispana sudo ĉar ene de la esperantismo neniu estas tiel forta. Male ni intencas kunordigi niajn penojn, sufiĉe gravaj ekde antaŭ kelkaj jaroj, por vivigi nian movadon en Andaluzio; kaj, dezirante kunlabori kun ĉiuj, helpi kaj esti helpataj de ĉiuj, ni devos krei kaj leĝigi propran Andaluzian Esperanto-Unuiĝon, kiu havos kiel celon laŭ siaj statutoj estigi la instruadon de Esperanto en Andaluzio kaj kunoridigi la aktivadojn de la lokaj grupoj.

La Statutoj estas jam pretaj, memoru ke laŭ akordo de la 1a E-Kongreso de Andaluzio, oni kreis komisionon kiu redaktus ilin, ĉi tiel en kunveno en Kordovo kaj dum 5 horoj oni traktis en siaj 32 artikoloj multajn temojn: Nomo de la Asocio, Sidejo, Asembleo, Estraro, Revuo, Junulara Sekcio, Financoj, ktp.

Nun estas la momento de la andaluzia esperantistaro, tiuj kiu deviĝis redakcii taŭgajn statutojn plenumis sian taskon; nur restas fini la leĝan proceson kiu permesos al ni okazigi la Ĝenelaran Asembleon de AEU dum la Malaga Kongreso. Nu, jen via ŝanco, ĉiuj andaluziaj samideanoj ricevos broŝuron pri la nova organizo kaj tiuj kiuj deziros daŭrigi kaj vivigi la Andaluzian Esperantismon povos aliĝi. Denove ni ripetas ke ni NE deziras izoliĝi nin de la cetera hispana movado, ni nur volas fortigi Esperanton en Andaluzio kaj havi propran asocion kiu reprezentos al nia regiono en la E-movadaj aktoj.

La Redakcio.

**Nomo:** Andaluzia Esperanto-Unuiĝo AEU

**Sidejo:** Str/ Pozo 3 SEVILJO-3

**Asembleo:** Formata de la tuta membraro, renkontiĝas en la kongresoj de Esperanto de Andaluzio.

**Estraro:** 1 prez, 1 vicprez, 1 ĝen, sekr. 1 kasisto kaj 1 voĉdonanto po provinco kies membroj elektis lin.

**Informilo:** Oficiala Bulteno GAZETO ANDALUZIA

**Junulara Sekcio:** Andaluzia Esperanto- JUnularo, kun propra regularo.

# INFORMOJ

## SEVILJO

Je la unua de Februaro komenciĝis la dua etapo de la elementa kurso gvidata de Sevilja Esperanto Akademio. La metodo, kiun ni uzos pro ĉi nova etapo estas Esperanto I.
Ankaŭ baldaŭ finiĝos la unua etapo de la perfektiga kurso, kiun oni gvidantas per la Nova Metodo de Fernando de Diego. Dum la dua etapo, ĉi perfektiga Kurso estos gvidata per Paŝoj al Plena Posedo.

Je la fino de Februaro vizitis nin s-ano Amador Díaz, kiu v nis kun sia edzino. Amador Díaz estas UEA-Delegito en urbo Southampton kaj vicprezidanto de Brita Esperanto-Asocio. Dum preskaŭ unu semajno, ili vizitis niajn klubojn, babiladis

kun ni tre diversaj temoj, ĉeestis kunvenojn, ktp. Fine, ni povas diri ke s-ano Díaz estas unu el la plej bonaj lingvoregantoj, kiuj vizitis nin.

Post la aperigo de la SEJO-anonceto en EPĈ, leteroj el ĉiuj partoj de la mondo invadis nin. Do, se iu ajn el vi volas korespondi eksterlanden, bv. komuniki al ni ĉar ni havas tioman korespondadon, ke preskaŭ estas neeble por ni respondi ĉiujn leterojn. Dankon!

Jam aliĝis al la 44a Hispana Kongreso de Esperanto preskaŭ 100 personoj, inter kiuj estas 4 eksterlandanoj. Ni pensas ke tiu nombro estas ankoraŭ malalta.
Ni ĵus eldonis la poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn de la Kongreso mendu ilin rekte al la LKK.

Ni metis en unu el la balkonoj de la Kultura kaj Sporta Centro de SEJO afiŝegon kie oni povas vidi vertan stelon kaj la vortojn "SEJO-Grupo Esperantista" kio estas samtempe en hispana kaj esperanta lingvo. Tiel, jam estas esperanta atentigilo en la junular-restadejo dum la Kongreso.

## MALAGO

La 2an de Marto vizitis nin George Egerton, samideano el Britio kun kiu ni interparoladis dum nia vendreda kunveno. Li donacis al la Grupo bolkrajonon kun la nomo "Esperanto" kaj la anglalingva frazo "La Internacia Lingvo".

- La 17an de Marto, s-ano Andrés Martín prelegis pri la Internacia lingvo en la Loka Vegetara Asocio. Li montris al la ĉeestantoj la revuon "Esperantista Vegetarano" kaj proponis gvidi kurson al tieaj societanoj.

- Ĉiu sabate, de la 4a ĝis la 6a horo vespere, kunvenas la gejunuloj por provludi teatraĵojn en esperanto.

- Ni komencis varbkampanjon pro aboniĝi al la "Gazeto Andaluzia". Unuavice, ni sendis informilon al ĉiuj andaluzoj kiuj enskribiĝis al perkorespnda kurso de ILEI.

- Ĵaŭde je la 8a vespere, ni kunvenas en la kafejo "Esperanto" kiu situas en la strato "Esperanto", apud la supervendejo "Esperanto, por parole praktiki la lingvon.

- La Urbodoma Biblioteko de "Arroyo de la Miel-Benalmádena", vilaĝo de Malago, elspezos 10.000 ptojn por aĉeti esperantajn librojn.

- Ekde Junio samideanoj el Fuengirola gvidos elementan kurson en la proksima vilaĝo Benalmádena aranĝita de la tiea Kulturdomo.

- Ni daŭrigas la elementan, perfektigan kaj praktikan kursojn de Esperanto en nia sidejo. Krome, ni instruas grupeton da radioamatoroj en ilia sidejo.

JHS

# KORDOVO

- La pasintan 19an de Decembro la Kordova Grupo festis la Zamenhofan Tagon ĉe tipa itala restoracio. Kiel jam estas kutimo la manĝado komencis kun tosto memore al la antikvaj kordovaj geesperantistoj. Poste ni manĝis, trinkis kaj iuj eĉ drinkis, en la festoj de la Kordova Grupo estas nek prelegoj, nek inaŭguroj, nur manĝaĵoj, trinkaĵoj kaj ĉarma bonhumoro. La venontan Decembron ni festos ĉi tagon ĉe tipa ĉina restoracio, kompreneble ni devas praktiki la internacian lingvon tutmonde.

- Por organizi la 8a HEJS-Tendaro la Kordova Grupo kontaktis unuafoje kun la Junulara Fako de la Urbodomo, ili afable babiladis kun ni pri la organizado de la Tendaro kaj kompreneble pri la internacia lingvo. Ĉar la Fakestro petis al ni, ni donacis al li Vortaron kaj Metodon de Esperanto kune kun kelkaj revuoj, inter ili LKE kaj GA, poŝtkartojn, kaj algluaĵojn. Samtempe

ni gluis algluajon de HEJS en la Junulara Fako de la Kordova Urbodomo. Ili oferis al ni esti tutrajta membro de la Kordova Junulara Konsilo, tamen ankoraŭ ni ne povos membriĝi, ĉar ni ne havas sufiĉan tempon por agi inde ĉie.

- Unu tago antaŭ ol la komenco de la 8a HEJS-Tendaro okazis en Kordovo la kunveno de kelkaj andaluzoj kiuj deviĝis redakcii la statutojn de la Andaluzia Asocio, kiu finfine nomiĝos "Andaluzia Esperanto-Unuiĝo".

## JEREZ

- Todos aquellos esperantistas o simpatizantes de esta lengua que deseen ayudar a formar un grupo local en Jerez de la Frontera, por favor contacten con: MATEO ARANDA SANCHEZ
C/ Las Torres 7
tfno. 34-73-87. JEREZ.

## la aliaj informoj

- NEKREDEBLE ! Ĉu vi jam konas la lastan informon pri "La Homo de Orce"? Ĉu ne? Vidu, laŭ la lasta eltrovo de la scienculoj ĉi unua andaluzo jam parolis ESPERANTO-n ! Sajnas ke apud li troviĝis ekzemplero de Pasporta Servo de la jaro Tricent mil AK, kaj la metodo "Lernu esperanton en dek minutoj kaj forgesu ĝin en unu".

- Pli ol dek mil mortoj provokis la gaspaĉo kies recepton ni publikigis pasintnumere. Ĉi cifero estas preskaŭ nenio se ni komparas kun tiu de la strangaj kuiraĵoj de "El Popola Ĉinio".



# BAROJ

Ĉiuj scias ke la Esperanto-movado deziras detrui la obst: najn barojn kiuj situas inter la dividitaj popoloj pere de int nacia lingvo, t.e Esperanto. Tamen estas vera strangaĵo vidi k: multfoje estas la geesperantistoj mem kiuj staras ĉi barojn en de nia propra movado. Jes, tio estas vera!

La lingvo, atentu temas pri la naciaj lingvoj, naskiĝis ilo por la komunikado, bedaŭrinde ĉiu lingvo unuiĝis kelkajn v laĝojn, kaj tio provokis ke por la milionoj da homoj ekzistus lionoj da lingvoj. Tamen venis en la mondon nova sento kiu ku iĝis la personojn kiuj deziris havi helpan lingvon por la inte: nacia komunikado. Naskiĝis tiel Esperanto kaj samtempe inter s: geparolantoj monda movado por la unuiĝo kaj paco de la mondo.

Bedaŭrinde nuntempe multaj el tiuj movadanoj amas pli si: nacian lingvon el sian internacian ideon, kaj ĉi-manere kreas novajn malutilajn barojn, parolante ne nur sia nacia lingvo sed ankaŭ sia regiona. Mi ne parolas pri krokodiloj sed pri novaj baroj la Esperantismo de Hispanio. Ekzemple kun katalunaj, galegaj, baskaj, majorkaj aŭ valenciaj samideanoj, ni havas du komunajn lingvojn t.e Esperanto kaj la hispana lingvo. Mi ŝatus paroli unu el tiuj, prefere Esperanto, tamen kion mi ne konsideras ta ĝa estas paroli unu el siaj naciaj lingvoj kun la intenco divi la personojn laŭ la lingvo; ĉar mi bedaŭrinde parolas nek bask: nek kataluna, nek majorka, nek valencia nek galega lingvo. Mi sas ke jam kaŭzas multajn problemojn ĉa diversaj lingvoj en ni: lando, kaj por la geesperantistoj, almenaŭ por ili, ne devas da ti ĉi problemon, se ni jam solvis la problemon de la interncia komunikado, ĉu ankoraŭ ne la nacia?

Ne kredu ke mi ne ŝatas la hispanajn lingvojn, tute mal kiel bona esperantisto mi amegas la lingvojn, krome mi pensas la lingvojn kiujn oni parolas en la hispana komunumoj estas be legaj, lernindaj kaj parolendaj de siaj nacianoj. Tamen al mi plaĉas la problemoj kiuj la ekskluziva uzo de tiuj lingvoj pro vokas en nia lando kaj precipe en la E-movado. Ekzemple, andal zo amas sian lingvon, hispanan kun propraj karakteroj, tamen vi ne trovos multajn paĝojn en la E-andaluzaj revuoj (4 nuntempe) Tamen ĉiuj konas esperantistan (?) revuon eldonita en Hispanio kiu estas tute ne-komprenebla por tiuj kiuj ne konas ĝian na- cian lingvon. Tio provokas ke nur la esperantistoj de tiu regi

no, aŭtonoma komunumo, nacio aŭ lando (la nomo ne gravas) povos legi ĉi revuon kiu intencas pligrandigi la ideon de internacia komunikado. Amikoj pensu ke Esperanto solvis unu el la plej gravaj problemoj de la mondo, pro tio ne kreu la problemon de la internacia ne-komunikado en la E-movado.

Estus ne-kredeble vidi vegetaranojn manĝante bongustan viandon dum festo; same ne devas okazi vidi verdstelajn personojn intencante dividiĝi pro la lingva problemo.

Mi mem

# PAĜO DE LA JUNULARO

En la projekto de Statutoj de AEJ kiujn oni aprobis en Kordovo la 20an de Aprilo aperas:

Art 7: La Asociación pondrá especial atención en hacer llevar sus actividades hasta la juventud. A tal efecto podrá constituir una sección juvenil que coordine las actividades propias que los jóvenes lleven a cabo, pudiendo contar ésta con un reglamento interior que no contradiga el presente Estatuto.

Jen propra artikolo por la andaluzia junularo kiu permesas al ni fondi junularan sekcion, AEJ, ene de la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo; la junularo povos komenci tiel sian propran vojon.

PROJEKTOJ:

- Aliĝi al HEJS kiel organizan membron.
- Organizi jaran renkontiĝon dum unu semajnfino en kelka junulara restadejo de nia regiono.
- Eldoni kelkajn paĝojn apud ĉi gazeto kiel specifan junularan andaluzian informilon.



# PRI KINO

**LA POSTA TAGO** (The Day After)

Kiel ĉiu bona usona filmo "La Posta Tago" estis tre konata en Eŭropo antaŭ ol sia prezentado en la kinejoj; la televido, la ĵurnaloj kaj revuoj jam parolis pri ĝi kaj precipe pri la grandaj diskutoj kaj polemikoj kiujn ĉi filmo provokis. Ĉi tio ne estas stranga se ni antaŭscias ke la prezentado en Usono kaj en kelkaj eŭropaj landoj okazis televide, tamen en Hispanio tiuj kiuj deziris vidi ĝin devis antaŭe aĉeti bileton en la kinejo.

Oni vidas ke La Posta Tago estas filmo por la televido, ĉa la terura etoso, kiun ĝi intencas provoki estas pli efika se ĝi okazas amase, Sed tio ne signifas ke ĉi tiu filmo ne estu bona, tute male ni povas diri ke ĝi estas unu el la plej vidindaj filmoj de la kuranta jaro. La intrigon vi jam konas, en usona urbo eksplotas du atomajn bombojn kiel rezulto de la milito inter Usono kaj Sovetunuiĝo. La komenco de ĉi milito ne estas tute klara, ŝajnas ke ĝi ekas pro kelkaj disturboj ene de la Demokrata Germana Armeo kiu provokas la invadon de la Okcidenta Berlino; la direktoro de la filmo intencas nek paroli nek klarigi la militaj agoj. Tiel la filmo temas pri la vivo de mezgranda urbo kaj kelkaj el siaj familioj ne pri grandaj politikoj aŭ militaferoj.

Kiel rezulto de ĉi tria mond-milito la usonanoj kaj la sovetanoj uzas sian atoman povon, kaj ĉi tiel du misiloj eksplotas en tiu urbo; la mortintoj estas multaj sed ili eĉ havas pli bonŝancon ol la vivantoj, ĉar ili ne havas manĝaĵojn, domojn, medikamentoj kaj si lajn. Multaj homoj fariĝas sovaĝajn bestojn kaj iuj, kvankam tio ne estas tute klara eĉ kanibalojn. Tamen la espero ne mortas, post unu tago de milito, la posta tago kiam preskaŭ ĉio estas jam detruit la prezidantoj de ambaŭ landoj decidas interrompi la militon, kvanka oni parolas pri armistico kaj ne pri paco.

La plej granda kaj grava espero estas la renaskiĝo de la vera amo kaj paco, de la lasta bildo, sur la urbo detruita unu homo, ne gravas kiu, oferas al alia sian malriĉan manĝaĵon: unu cepon. Kiel resumo oni povas diri ke La Posta Tago estas tre bona verko, la plej granda difereco inter ĝi kaj la ceteraj filmoj pri la ebla Fina Milito estas unu: en La Posta Tago la Mondmilito ja okazas.

# s e j o

SOLVENDA SITUACIO

Kuriozinde nun, kiam ni devas aranĝi nacian kongreson, la sevilja movado komencas ekfali. La helpo, fare de la membroj, mankas al ambaŭ seviljaj esperantaj asocioj. Fakte, en Seviljo nur laboras SEJO. Sed, kio estas SEJO? Certe ĝi ne estas tiel forta, laborema kaj fruktodoniga kiel ĝi aspektas. Per la fingroj de ununura mano oni povus kalkuli la personojn kiuj iel laboras por SEJO. Same okazas al Sevilja Esperanto-Asocio. Ni eĉ povus diri, ke tiu organizo ne ekzistas. Ĉu gvidi kurson estas la nura celo kiun asocio devas havi? Certe ne. Io mankas al la sevilja movado, eble plia ambicio, energio kaj iluzio. Ni konsciu, ke la problemo estas gravega: ni troviĝas antaŭ la aranĝo de nacia kongreso kaj la plejmulto el la membroj ŝajnas havi nenian intereson pri kongresaj temoj. Oni devas insisti al ili pri aliĝo, kunlaboro, ktp.

Iuj diris ke nur du aŭ tri personoj sufiĉas por aranĝi kongreson sed tio jae ne veras. Tiuj malmultaj personoj, kiuj troviĝas antaŭ la aranĝo de kongreso rimarkas ke ili estas preskaŭ izolitaj, forlasitaj, kaj certe tio demetas la animon kaj iluzion al la plej energia aranĝanto. Do, kion fari antaŭ tia situacio? Nia vorto estas la sama ol la vorto de multe da esperantistoj: antaŭen! Ni ne povas atingi miraklojn. Ni nur konas la laboron, kaj tiu ne mankos al la malmultaj personoj kiuj strebas levi la movadon en Seviljo. Ĉiu membro konsciu ke la problemo estas ĉies; ne nur de Sevilja Esperanto-Asocio sed ankaŭ de SEJO. Ne temas pri la faliĝo de iu asocio, sed pri la faliĝo de tuta movado en unu urbo.

Ni esperas, ke ĉi-artikolo vere taŭgos por konsciigi niajn anojn, ke la problemo vere gravas, kaj ke ĉies kaj ĉia helpo estas nun nepre necesa.

SEVILJA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

S . E . J . O .

# ANDALUZIA VOĈO

En la pasinta numero, la samideano Rafaelo Pleguezuelos petis informojn pri esperantaj radiolesendon eksterlandaj. Do bone, ĉiutage kaj precipe sabate kaj dimanĉe je la 12'30 UT(Universala Tempo) vi povas aŭdi familian esperantan paroladon. Je tia horo kaj en 14.265 K.hercoj (5 pli malpli laŭ intermiksoj) la ILERA-anoj havas nian konversacian rondon. ILERA estas la Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj. (Ankaŭ ĉiutage matene en 7.065 je la naŭa proksimume).

Bedaŭrinde, estas tre malfacile aŭdi per neradioamatora ricevilo al ni. Per nia rondo, esperanto disvastiĝas (ĉu vi sciias ke nun, ĉirkaŭ 200 hispanaj radioamatoroj lernas Esperanton per ILEI-a koresponda kurso?)kaj diskoniĝas.

Jaren nia havas esperantan konkurson (temas pri komunikokun la plej ebla nombro da esperantaj radioamatoraj stacioj) dum la tria semajnfino de oktobro, kaj ankaŭ ni havas revuon kaj Radioamatoran Esperanto-terminaron.

En Hispanio, la delegito de ILERA kaj delegito de ILEI por radio-amatoraj aferoj, estas la samideano Rafaelo Ayala, C/ San Acisclo 35-E, 8º 1ª. Barcelona 31.

Je via dispono: Luis Gilpérez Fraile EA7CAC.

(El la Paĝoj 10-a)

to komenci seriozan laboron por, senĉese kaj digne, uzi la radion por Esperanto almenaŭ semajne.

Por nenio sevos niaj klopodoj se ni agadas serioze kaj laŭ antaŭvidita plano. Tial mi petas de vi, ke jam de nun penu por realigi la ideon trafe montratan en la unua nº de la nova epoko de GAZETO ANDALUZIA, kontaktante aliajn gesamideanojn por sciigi al ili pri la projekto.

Miaflanke, vi ĉiam trovos la plej favoran kaj helpan sintenon.

ANDRES MARTIN

Plaĉegis al mi konstati la entuziasmon de Rafael Pleguezuelos montratan en la pasinta numero de GAZETO ANDALUZIA. La Radio, ankaŭ, estas taŭga rimedo por disvastigi Esperanton en nia lando. Similan artikolon mi aperigis en la bulteno Boletín de Federación Española de Esperanto nº 254, novembro-decembro 1982. Al mia propono, bedaŭrinde, neniu respondis nek favore, nek kontraŭe. Laŭ mia opinio, multaj geesperantistoj ŝatas la Movadon kaj Internacian Lingvon kiel hobion. Por ili, la afero ne postulas grandan kompromison. Laŭ aliaj, okazas tute kontraŭe, kvankam la rezultato estas sama: neniam helpas. Eĉ ne respondas opiniante, sugestojn faritajn de samideanoj; ŝajne, Esperanto estas bieno kies fruktojn ili devas ĝui.

Kompreneble la kazuistiko ampleksas pli multajn specojn de esperantistoj. Troviĝas, ekzemple, la mallaboremaj, la hezitemaj... kaj, ankaŭ (kial ne jesi tion?), la entuziasmaj. Estus bedaŭrinde, ke ĉi lastaj ne povus plenumi siajn projektojn pro manko de helpo. Vi, Rafael, daŭrigu, serĉu helpon, eku labori por ke Esperanto eniru en la Radion. Sed estas necese plani la agadon por certigi la sukceson. Ĉi-cele, mi kuraĝe audacas proponi al vi iujn rimarkojn. Unue, nepras estigi la necesan grupon da redaktoroj. Ĉi tiuj, kune kun vi, povos studi la eblecojn radioelsendi en Esperanto kaj pri E-o. Due, venkinte la unuajn malfacilaĵojn, konvenas elekti la temojn. Ĉu kurso de E-o? Ĉu sciigoj pri la Movado, ĉu ĝeneralaj informoj pri Andaluzio? Ĉiam en Esperanto? En hispana lingvo? Dulingve? Ĉi tiuj kaj aliaj demandoj necesas fariĝi antaŭ ol komenci la konkretan agadon. Estas nepre kompreni, tute klarekion ni célas kaj kiel ni intencas atingi tion. Kiam ni (mi diras "ni" ĉar la afero apartenas al la Movado kaj ĉar mi kunlaboros kun vi, se vi tion ŝatus taŭga) certos ĉi-rilate, ni paŝos al la sekvanta fazo. Antaŭ ol paroli kun respondeculoj de la Radio, konvenas konversacii pri la temo kun personoj kapablaj influi en la opiniajn de radioparolistoj por ke oni akceptu nin. Kiam ni certos pri la favora kriterio de la parolisto, vizitu lin kaj konigu al li nian agadplanon. Poste ni vizitu ankaŭ la Direktoron de la Radiostacio kaj, denove, sciigu al pri niaj celoj. Ni devas prezenti al Parolisto kaj al Direktoro nian kondretan agadplanon kaj la solvojn al eblaj problemoj okazontaj. Se ili konsentas, jam alvenas la momen-

(Sekvas en la paĝo 9-a)

# poezio

## ANDALUZOJ DE JAEN

Andaluzoj de Jaen
fieraj olivprenantoj
diru min sincere: jen
kiu starigis l'olivarbojn?

Ne starigis ilin l'hazardo
nek la sinjoro kvita
sed ja la tera lardo
kaj via frunto ĉiame svita.

Kune kun la akva puro
kaj tuj apud la planedoj
la tri donis la naturon
al viaj retorditaj piedoj.

Stariĝu, olivarba blankharo
oni diris tra la vento
kaj ĝi levis branĉaron
povan ja de cemento.

Andaluzoj de Jaen
fieraj olivprenantoj
diru min sincere: jen
kiu mannutris l'olivarbojn?

Via sango, via vivo
ne tiu de l'perforteprenanto
kiu enriĉiĝis pro l'naivo
malavara de l'ŝuldanto.

Ne de kiu ekspluatas grundon
kiu sub povreć vin entombigis
kiu piedpremis vian frunton
kiu vian kapon malgrandigis.

Arboj, kiujn via peno
oferis je la tagmezo
estis ero da bieno
kiu alia igis spezon.

Kiom da olivaj jarcentoj
manoj kaj piedoj ligitaj
tag' al tage viaj lamentoj
sur viaj ostoj elternitaj.


Andaluzoj de Jaen
fieraj olivprenantoj
diru min sincere: jen
kies estas tiujn olivarbojn?

Jaen stariĝu brava
sur via luna ŝtonaro
kaj ne estu ejo sklava
kun via tuta olivarbaro.

Ene de la klareco
de l'oleo kaj siaj aromoj
indikas vian liberecon
la liberecon de viaj domoj.

MIGUEL HERNANDEZ

El la hispana tradukis: José María Rodríguez Hernández.



# AMUZAĴOJ

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| DEK | EN | SA | O | LA |
| LA | KA | SES | RE | RO |
| VAN | NAŬ | | VER | SO |
| ZOS | KON | U | VE | JA |
| A | KU | ĈI | GRE | NI |

Legu la frazon, komencante sur la subskrita silabo kaj sekvante laŭ la movoj de la ŝakluda ĉevalo



ENIGMO

La fantomo de la redaktejo aperas ĉiunokte akurate je la 12 horoj. Sia aperado daŭras nur ekde la unua sono de la sonorilo ĝis la lasta. Se ni scias ke ĉiu 6 sonorludoj daŭras 6 sekundojn. Kiom daŭras la apero de nia fantoma amiko?

ATENTU ni lotos andaluzian algluaĵon inter la solvantoj de ĉi enigmo.

SOLVOJ

| | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | B | | | | | |
| | | | | M | A | N | | | | |
| | | | R | O | L | O | N | | | |
| | | P | A | N | A | M | O | N | | |
| | S | A | | Ŝ | I | A | | O | N | |
| N | E | P | R | A | | R | A | R | O | N |
| | N | O | | N | E | G | | D | I | |
| | | N | O | Ĝ | N | A | R | A | | |
| | | | N | O | T | N | A | | | |
| | | | | N | I | A | | | | |
| | | | | | P | | | | | |

IMPRESOS
========

"GAZETO ANDALUZIA"

Dissenda Centro
C/ Sol 75

S E V I L L A - 3